

# *La Riverego* kebekia esperantista bulteno

Septembro 2008

Esperanto-Societo Kebekia

Jaro 23, No 93

## Solidaremo inter Esperantistoj!

*Zdravka Metz*

Statistikojn kelkaj ne ŝatas. Aliaj diras ke ne ĉiam veras la informoj. Tamen, tiuj niaj ciferoj, niaj statistikoj indikas por TAKE 7 ke en Esperantio regas solidareco kaj helpemo.

Vi ja scias ke la Amerika kontinento estas granda kaj vojaĝoj multekostaj... Kiam la Montreala komitato akceptis la taskon organizi TAKE 7, en Septembro 2006, ni tuj konsideris grave peti financan subtenon, kiun ni povus uzi por inviti gravajn Esperantistojn kiuj kontribuas al la plibonigo de la programo.

La petita helpo venadis el diversaj landoj kaj kontinentoj, foje de homoj kiuj diris ke ili eĉ ne povos partopreni la kongreson. Financan subtenon por la programo ni ankaŭ ricevis de Esperantic Studies Foundation, de Kanada Esperanto-Asocio, de Esperanto-Societo Kebekia, de Esperanto-Klubo de UQÀM kaj de kvartala deputito, Nicolas Girard, por subteni volontulan laboron.

Solidaremo tuŝis nin. Estis kolektita monsumo de 13 060 \$. Danke al tiu sumo, ni plezure povis venigi ses gravajn personojn kaj ni financis ilian flugon kaj

restadon. Niaj specialaj invititoj estis: Maritza Gutiérrez González kaj Julián Hernández Angulo el Kubo, José Antonio Vergara el Ĉilio, Atilio Orellana Rojas el Nederlando (Argentino), Rubén Ortiz Hernández el Gvatemalo kaj José Carlos Morales Morales el Kostariko.

Krome, por subteni la movadon en Latinameriko, ni aĉetis tri porteblajn komputilojn kaj ricevis du komputilojn donace de kongresanoj. Solidareco ne estis nur por Latinamerikanoj. Ni sukcesis trovi senpagan tranoktadon por 27 personoj en 10 familioj. Ni ankaŭ ebligis al pluraj personoj partopreni senpage la kongreson kaj bankedon ĉar ili multe helpis dum la kongreso. Tiuj volontuloj estis gravaj al ni, por ebligi plenan sukceson de la kongreso. Volontuloj estis ĉiam pretaj helpi. Foje ni havis nur horon por prepari lokon, ĉu por spektaklo, ĉu por bankedo, ĉu por organizi vesperan trinkejon. Bone ke ni povis fidi je granda taĉmento da junaj helpantoj.

Laŭdojn ni rikoltis poste, surloke, ni aŭdis ridojn, amikajn babiladojn, ni vidis ĝojon en okuloj de kongresanoj. Tio estis nia granda

danko, ke ni sukcesis organizi bonan kongreson. La kongresa komitato de TAKE 7 elkore dankas ĉiujn kiuj donacis ion, grandan aŭ malgrandan sumon. Ni dankas ankaŭ al volontuloj. Fine dankon al ĉiuj kiuj fidis al ni kaj decidis veni kaj partopreni TAKE 7 en Montrealo. TAKE 8 okazos en Brazilo en 2011. Ĝis revido!

## En bref au sujet du congrès!

*Zdravka Metz*

Nous avons reçu 223 inscriptions et de ce nombre, 191 personnes ont participé au congrès. Nous avons accueilli des participants de 15 pays, soit des délégués d'Allemagne, de la Belgique, du Canada, du Chili, du Costa Rica, de Cuba, des États-Unis, de la France, du Guatemala, de l'Italie, du Japon, du Mexique, des Pays-Bas, de la Russie et de la Suisse. Un congrès vraiment international!

# Pri la financa raporto

*Sylvain Auclair*

La jaro finiĝinta la 31<sup>an</sup> de Majo estis escepta laŭ la financa aspekto. Ne, ni ne preskaŭ bankrotis nek ricevis heredaĵon de riĉegulo, sed komencis ricevi la kotizojn kaj donacojn por la Tutamerika Kongreso de Esperanto, kiu okazis dum pasinta Julio. Tio kaŭzis, ke niaj aktivoj kreskis en unu jaro de 7 000 \$ ĝis 46 000 \$!

Ĉar la elspezoj rilataj al TAKE estis okazontaj ĉefe en Julio, sekve en la nuna financa jaro, mi skribis la kotizojn kiel antaŭricevitajn pagojn, kiel pasivojn, kiuj sekve kreskis de 2 000 \$ ĝis preskaŭ 40 000 \$. Por kasisto de eta asocio kiel la nia, tiaj ciferoj estas kapturnigaj!

Nia gajno dum la financa jaro de la unua de Julio 2007 ĝis la 31<sup>a</sup> de Majo 2008 tamen estis pli alta ol kutime; ĝi atingis 1 580 \$-jn.

Kvankam mi klopodis, ke TAKE ne influu nian kontojn, mi tamen devis akcepti la donacojn (pli ol 4 500 \$) kaj subvencion (Fondaĵo Esperantic: 2 000 \$) kiel tiujarajn kotizojn, por esti kapabla emisii oficialajn kvitancojn; kaj ĉar ni subvenciis vojaĝojn (pli ol 5 000 \$) pere de tiuj donacoj, ankaŭ tiuj kostoj estis enkalkulitaj.

Mi tamen povas diri, ke la kotizoj iom kreskis, de 645 \$ al 821 \$. Male, malkreskis la pagoj de abonoj al *Le Monde de l'Espéranto*, kio igas la estraron demandi sin, ĉu indas plu oferti tiun servon al niaj membroj.

Fine, se vi legis tiun artikolon ĝis la fino, vi certe ŝatas kontojn kaj ciferojn. Ĉu vi ne konsiderus iĝi la kasisto de nia eta asocio?

# Kiu partoprenis TAKE 7?

*Zdravka Metz*

Simpla demando malsimple respondebla. Kial? Ĉar ja facilas scii kiom da personoj aliĝis al la kongreso: ni atingis 223 aliĝintojn. Sed el tiuj kiom da sukcesis veni? Ni certas pri 191 sed povas esti kelkaj pliaj ĉar diversaj personoj (volontuloj) deĵoris ĉe la kongresa akceptejo kaj ne ĉiam estis notita klare ĉu iu alvenis aŭ ne. Fine tio ne tro gravas nun.

Mi informu vin pri la landaj statistikoj de la partoprenintoj, jen ili: po 1 persono el Belgio, Ĉilio, Germanio, Gvatemalo, Italio, Japanio, Kostariko, Nederlando, Argentino, Svisio; 5 el Kubo, 6 el Rusio, 8 el Meksiko, 9 el Francio, kaj, kredo aŭ ne, po 77 el Kanado kaj Usono. Sume ni bonvenigis homojn el 15 landoj. Vere internacia, amikeca etoso regis dum TAKE 7 en Montrealo.



**Société québécoise d'espéranto  
Esperanto-Societo Kebekia**

*La Riverego* (Le Fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto quatre fois par année, en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux : Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 0830-9574. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise avec mention obligatoire de la source. Photocopié à 90 exemplaires. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto. Rédaction : Jérôme Frédéric Bouchard (jero@esperanto.qc.ca). Administrateurs de la SQE : Boris-Antoine Legault (président), Martin Benoit (vice-président), Jérôme Frédéric Bouchard (secrétaire), Sylvain Auclair (trésorier) et Normand Fleury (conseiller).

*La Riverego* estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia kvarfoje dum la jaro : Marte, Junie, Septembre kaj Decembre. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Fotokopiita 90oble. Senpage por la membroj de la ESK. Por la aliaj, la jara abono kostas 10 kanadajn dolarojn. UEA-kodo de la Societo : keb-kd. Redaktado: Jérôme Frédéric Bouchard (jero@esperanto.qc.ca). Estraranoj de ESK : Boris-Antoine Legault (prezidanto), Martin Benoit (vicprezidanto), Jérôme Frédéric Bouchard (sekretario), Sylvain Auclair (kasisto) kaj Normand Fleury (konsilanto).

Échéance pour le prochain numéro / *Limdato por la venonta eldono* : 2008.12.01

6358-A, rue de Bordeaux • Montréal • H2G 2R8 • info@esperanto.qc.ca • www.esperanto.qc.ca

# Dankon al niaj gastigantoj

## Zdravka Metz

Ĵus la taksio forveturigas la lastajn gastojn al flughaveno, kiuj, post dumonata restado en Eŭropo, forflugos de Montrealo al Meksikio, hodiaŭ 16<sup>am</sup> de Septembro. Ili estis tri el 27 gastoj, kiuj estis feliĉaj ĉe 10 familioj, kiuj malfermis sian pordon kaj senpage ofertis litojn. Niaj gastoj estis kvin el Kubo, kvin el Meksikio, unu el Ĉilio, unu el Argentino, naŭ el Usono kaj ses el Kanado.

Mia tasko estis kontakti Esperantistojn, gastigantojn; poste mi prezentis rete al ili gaston, unu, du aŭ pli. Ĉio bone funkciis por alveni, trovi domon kaj dum TAKE kaj niaj gastoj estis dankeme kontentaj. Mi estis okupita dum tiu semajno kaj tuj post la kongreso mi ekferiis en Kroatio.

Jen la kaŭzo pro kio mi eĉ ne telefonis por danki al gastigantoj, sed nun skribas al ĉiuj.

Nome de organizantoj de TAKE kaj gastoj, mi volas diri al vi elkoran kaj grandan DANKON.

Samtempe mi volas prezenti al vi tiujn gastigantojn de TAKE :

Aline kaj Jean, Jessy, Patriko kaj Jacqueline, Jean-Claude, Daniela kaj Rumeno, Mikaela kaj Francisko, Mateo, Béatrice kaj Jero, Dominique kaj Cyril, Zdravka kaj Normando.

Mi rakontu al vi kelkajn anekdotojn rilate panon kaj kongreson.

Por la pano mi nepre danku al Jano, kiu invitis nin serĉi panon nome de organizo Teresto. Por ni ne konvena horo 20<sup>a</sup>, kiam la bakejo fermas pordon. Tiam ĝuste okazadis interkona vespero. Do, ni transdonis taskon al Damir, kiu kredis ke li reportos hejmen unu grandan sakon. La surprizo estis granda kiam bakisto montris ses grandajn plastajn sakojn plenajn je bona, diverspeca pano. Li ofertis transporti la sakojn ĝis la domo. Mi ne menciis ke, veninte hejmen, preskaŭ noktomeze, ni ne sciis kien meti la sakojn kun pano kiu tiom bone odoris...

Ĉiumatene, dum kongresa semajno, ni prenis unu sakon.

Panon ni havis en LKK-ĉambro kaj ĝi nutris multajn, kiuj ne havis tempon forlasi LKK-oficejon. Foje ian fromaĝon kaj arakidan paston eblis surmeti. Kelkaj manĝis panon por deserto, aŭ simple kiel manĝeton en kongresejo.

Panon povis gustumi ĉiuj kongresanoj dum vesperaj programoj. Unu volontulo dolorigis manon tranĉante ĝin en tioma kvanto. Ĝi ja bongustis trinkante bieron aŭ vinon.

Panbulkojn mi provis sendi po kelkaj al iu alia gastiganta familio. Ja, okazis ke gasto, pro laciĝo de vigla taga kaj vespera kongreso, simple eliris taksion kaj forgesis la panon sur sidloko.

Pluraj gastoj, kiuj loĝis en apudaj domo kaj apartamento, kuniĝis ĉiumatene por matenmanĝi. Kompreneble la ĉiam preta manĝo estis pano kaj konfitaĵo.

Eĉ kiam finiĝis la kongreso, restis kelkaj panoj, panbulkoj kiuj facile fariĝis sandviĉoj por la vojaĝo.

Do tiu pano estis vere bonvena kaj helpis nutri multajn personojn. Eble Jano devus rakonti la historion de pano al la panbakisto?

Feliĉon ja sentis niaj gastoj, pri kiuj vi ĉiuj zorgis. Dankon al vi!!!



*Dancantino dum kultura vespero  
Fonto : Andreo Grossman  
el Francio*

# Les médias ont parlé en masse de TAKE 7

*Normand Fleury*

---

Il n'est pas évident de faire un bilan complet de la couverture médiatique concernant le 7<sup>e</sup> Congrès d'espéranto des Amériques à Montréal en juillet dernier. Boris-Antoine Legault a eu la brillante idée de diffuser le premier communiqué via l'agence de presse privée Market Wire en version française et anglaise. La Presse Canadienne a repris l'information et a publié un article beaucoup plus long, qui a fait boule de neige... même si nous étions en été! Bref, rapidement Boris-Antoine fut presque submergé de demandes d'entrevues aussi bien en français qu'en anglais. Vous trouverez, plus bas, une liste partielle des apparitions dans les médias. Un succès sans doute inégalé dans l'histoire de l'espéranto au Québec. Chapeau à Boris!

## Raporto pri raportoj pri TAKE 7

*Normand Fleury*

---

Mi aktivas en la kebekia Esperanto-movado de 1983 kaj neniam vidis tiom grandan interesiĝon de la amaskomunikiloj pri Esperanto. Vere post la aperigo de mallonga artikolo dulingva, verkita de Boriso kaj dissendita tra Kanado pere de la komerca servo Market Wire, tuj ekestis vigla reago de ĵurnalistoj tra Kanado. Helpis al tio la fakto ke Kanada Novaĵagentejo (Presse Canadienne) verkis kaj dissendis longan artikolon pri la kongreso. Uzis tiun informon diversaj gazetoj tra tuta Kanado. Estus malfacile listigi ĉiujn artikolojn kaj intervjuojn ĉar ili estis vere multnombraj kaj Boriso momente dronis sub petoj kaj telefonvokoj de ĵurnalistoj. Mi volas gratuli Borison por tiu grandega sukceso ĉar nun miloj da Kanadanoj aŭdis denove pri la ekzisto de Esperanto kaj pri tio ke ne temas pri projekto kiu jam malaperis.

### Artikoloj en gazetoj / Articles de journaux

Presse Canadienne / Canadian Press; Le Devoir, Montréal; Ottawa Citizen; Montreal Mirror; The Montreal Gazette; Calgary Herald; kaj aliaj / et bien plus !

### Retejoj / Sites web

Reuters.com; matin.qc.ca; cyberpresse.ca; agendapublic.com; grandquebec.com; findarticles.com; frimmin.com; kaj multaj multaj aliaj / et beaucoup beaucoup d'autres.

### Radio-elsendoj / Émissions de radio

Radio Canada Montréal (elsendoj l'Été et rien d'autre, Émissions culturelles, Sans détour, etc); Radio Ville-Marie Montréal; Radio Noon, CBC Montreal; National Public Radio, Usono; CIBL Montréal; The Current CBC Montreal; CFMB Montréal; Radio Canada Québec (Retour sur le monde); Corus FM Montreal; Radio Canada International (France, Angle, Hispanie, Portogale) kaj tiel plu / et encore plus...

Fakte kiam mi tajpis ĉe Google «Esperanto Montreal» mi trovis multajn aliajn retejojn kiuj raportis pri la kongreso kaj ankaŭ tra Usono.

# La starpunkto de Universala Esperanto-Asocio pri lingvaj rajtoj

## UEA

*Universala Esperanto-Asocio, kiu ĵus reprezentigis en la Socia Forumo de la Homrajta Konsilio de UN en Ĝenevo, estis invitita prezenti al la Konsilio deklaron pri sia starpunkto en afero, kiun ĝi trovas grava. UEA havas la rajton sciigi siajn starpunktojn ankaŭ al tiu grava organo de Unuiĝintaj Nacioj pro sia oficiala statuso de Neregistara Organizaĵo en specialaj konsultaj rilatoj kun la monda organizaĵo. La aktuala deklaro de UEA temas pri lingvaj homaj rajtoj kaj estis submetita al la 9<sup>a</sup> sesio de la Homrajta Konsilio en Ĝenevo (8-26 septembro) en la angla, franca kaj hispana lingvoj. Ĉi-sube sekvas ĝia Esperanta versio.*

Lingvaj rajtoj estas esencaj por ĉiu popolo, sendepende de la grandeco de ties membraro. Tiuj ĉi rajtoj devas esti protektataj precipe por malgrandaj grupoj. Universala Esperanto-Asocio subtenas minoritatajn lingvojn de pli ol 100 jaroj.

La rajto de infanoj lerni sian gepatran lingvon kaj daŭrigi sian edukadon uzante sian gepatran lingvon, ne nur estas grava por ilia kulturo; ĝi estas fundamenta por ilia psika evoluo. Pluraj larĝskalaj studoj en multaj diversaj landoj demonstris, ke se indiĝenaj kaj minoritataj infanoj estas edukataj ĉefe uzante ilian gepatran lingvon

kiel lingvon de la instruado dum la unuaj 6-8 jaroj (kun samtempa, bona instruado de la reganta lingvo kiel dua lingvo, fare de dulingvaj instruistoj), iliaj ĝeneralaj lernatingoj estas pli bonaj. Krome, ili lernas la regantan lingvon pli bone ol se ilia instruado okazus per la reganta lingvo. Se ili estas instruataj en la gepatra lingvo nur unu aŭ du jarojn kaj ili poste devas transiri al la uzo de la reganta lingvo, ili povas komence sukcesi relative bone, sed proksimume ekde la kvara lernojaro ilia progreso ekmalrapidiĝas kaj la diferenco inter ili kaj la infanoj parolantaj denaske la regantan lingvon plukreskas.

Ankaŭ gravas, ke la homoj kapablu komuniki je diversaj niveloj. UEA apogas lernadon de 2, 3 aŭ 4 lingvoj, laŭ la cirkonstancoj, t.e.

1. La gepatran lingvon,
2. La regionan lingvon, se ĝi estas malsama,
3. La nacian lingvon, se malsama ol la du unuaj,
4. Internacian lingvon, kiu apartenas al neniu nacio – nome Esperanto.

Esperantistoj scias, ke kiam multnacia grupo uzas unu neŭtralan, komunan lingvon, la kvalito de la komunikado estas ege specifa. La fina celo de Esperanto estas antaŭenigi

pacon inter popoloj igante la komunikadon pli facila kaj pli justa. Uzo de komuna lingvo evitigas situacion, en kiu homoj uzantaj sian gepatran lingvon havas grandegan avantaĝon super la aliaj.

Ni dezirus ke Unuiĝintaj Nacioj pripensu tion ĉi koncerne siajn proprajn kunvenojn. La diferenco estas tre evidenta, kiam oni aŭdas delegitojn, kiuj sin esprimas en la angla, la franca aŭ la hispana, kaj por kiuj tiu ĉi estas ĉu la dua ĉu la tria lingvo. Kiam ekparolas iu uzanta sian gepatran lingvon, ofte la diferenco estas frapa - kion tiu ĉi diras, havas multe pli da pezo kaj allogas la atenton multe pli ol parolanto uzanta fremdan lingvon.

## Referenco

« Deklaro pri rajtoj de personoj apartenantaj al naciaj aŭ etnaj, religiaj kaj lingvaj minoritatoj », adoptita de la Ĝenerala Asembleo, rezolucio 47/135, je la 18<sup>a</sup> de decembro 1992.

[www.unhchr.ch/html/menu3/b/d\\_minori.htm](http://www.unhchr.ch/html/menu3/b/d_minori.htm)



# Zamenhof-festo en Unesko la 15<sup>an</sup> de Decembro 2008

*Renato Corsetti*

---

Iniciate de la pola delegitaro ĉe Unesko, subtenata de la litova delegitaro, kaj en kunlaboro kun Universala Esperanto-Asocio, la 15<sup>an</sup> de Decembro 2008 okazos en la sidejo de Unesko en Parizo solenaĵo por celebri la naskiĝon de Lazaro Ludoviko Zamenhof. Samtempe ĝi estos bela enkonduko al la jaro 2009<sup>a</sup>, la 150<sup>a</sup> datreveno de la naskiĝo de Zamenhof.

Dum la festo estos pluraj oficialaj salutoj de la ambasadoroj kaj de

reprezentantoj de Unesko kaj sekvos poste paroladoj, spektado de filmeto pri Esperanto kaj bufedo. La ĉefaj paroladoj estos tiuj de la franca lingvistino Henriette Walter kaj de la nepo de Zamenhof, Louis Zaleski-Zamenhof.

La tuto en solena etoso okazos de la 17h30 ĝis la 20h30 en la sidejo de Unesko en Parizo (7 place de Fontenoy, 7<sup>a</sup> distrikto).

Ĉiuj esperantistoj estas varme

invitataj partopreni. Por eniri la sidejon de Unesko vi devos esti en listo antaŭliverota al Unesko. Por esti en tiu listo, se vi pretas partopreni, bonvolu tuj sendi al la ret-adreso [zamenhof.che.unesco@co.uea.org](mailto:zamenhof.che.unesco@co.uea.org) vian personan nomon, familian nomon, poŝtan adreson kaj ret-adreson.

Venu, ni deziras montri al Unesko kiom da ŝatantoj de la lingvo de Zamenhof estas en vagonara malproksimeco de Parizo.

## Fête de Zamenhof à l'Unesco le 15 décembre 2008

*Renato Corsetti*

---

À l'initiative de la délégation polonaise à l'Unesco, soutenue par la délégation lituanienne et en collaboration avec l'Universala Esperanto-Asocio, des solennités auront lieu le 15 décembre 2008 au siège de l'Unesco pour célébrer la naissance du D<sup>r</sup> Louis Lazare Zamenhof. Ce sera en même temps une belle introduction à l'année 2009, celle du 150<sup>e</sup> anniversaire de la naissance de Zamenhof

Durant la fête, il y aura des salutations officielles des ambassadeurs et représentants de l'Unesco, sui-

vies par des allocutions, un spectacle de petits films sur l'espéranto et un buffet. Les principales interventions seront celles de la linguiste française Henriette Walter et du petit-fils de Zamenhof, Louis Zaleski-Zamenhof.

Le tout aura lieu dans une ambiance solennelle de 17h30 à 20h30 au siège de l'Unesco, à Paris (7 place de Fontenoy, Paris 7<sup>e</sup>).

Tous les espérantistes sont chaleureusement invités à y participer. Pour entrer au siège de l'Unesco,

vous devrez être inscrit sur une liste qui sera mise à la disposition de l'Unesco. Pour être sur cette liste, si vous êtes prêt à y participer, veuillez tout de suite envoyer à l'adresse suivante [zamenhof.che.unesco@co.uea.org](mailto:zamenhof.che.unesco@co.uea.org) votre nom, votre adresse postale et votre adresse courriel.

Venez, nous souhaitons montrer à l'Unesco combien il y a d'amoureux de la langue de Zamenhof loin de Paris par le rail.

# La Asocio

## *Finfine firmfundamenta historio!*

# 15 kandeloj por ARE !

Ivo Durwael

Doktoro Ziko Van Dijk pretigis Esperantan libron, 304-paĝan.

Ĝi ne estas « plena historio de Esperanto », sed tamen de la plej grava parto de ĝi, nome la historio, sub la ombrelo de UEA.

Kaj nepre estas vere la unua nia historio, kiu havas firman sciencan bazon. Ziko funde esploris ĉiujn gravajn dokumentojn en la Centra Oficejo, kaj ne nur tiujn dokumentojn, sed ankaŭ multajn kiujn li ricevis de aliaj instancoj. Granda avantaĝo estas ke en multaj « historietoj » ambaŭ partioj povis konigi siajn argumentojn, kiuj ofte ne estas troveblaj en nia gazetaro! Ĉe konfliktoj en nia asocio ja tre ofte okazas ke unu en la koncernataj

partioj estas buŝumita, pro manko de diskoniga organo!

Kiu volas paroli pri Esperanto-historio, kaj ne nur klaĉi « el la nuko », nepre bezonas seriozan studadon de tiu ĉi monumenta verko.

La libro aperos post kelkaj monatoj. Sed kiu antaŭmendas ĝin ricevas 10% rabaton, do por € 21,60 anstataŭ € 24,00 (plus realaj sendokostoj, kun minimumo de € 3,00). Tiu ĉi oferto validas ĝis la 1<sup>a</sup> de februaro 2009.

Mendoj: FEL, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen  
[retbutiko@fel.esperanto.be](mailto:retbutiko@fel.esperanto.be)

Normand Fleury

Jen la 15<sup>a</sup> jaro dum kiuj la Esperantistoj el nord-orienta Nord-Ameriko amike kunvenas por praktike uzi Esperanton. La Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto okazos denove en Silvero (Silver Bay) apud la bela Georga lago en NovJorkio. Invitu ankaŭ viajn amikojn se ili interesiĝas pri baza kurso dum semajnfino. La programo estas varia kaj krom la prelegoj, okazas ludoj, eksteraj sportaj aktivecoj, amikeca kaj kultura vesperoj kaj multe pli. Vidu detalojn kaj enskribiĝu ĉe : [www.esperanto.qc.ca/eo/are](http://www.esperanto.qc.ca/eo/are)

# 15 chandelles pour ARE !

Normand Fleury

Nous vous invitons à participer à la 15<sup>e</sup> rencontre automnale d'espéranto à Silver Bay au Lac George (NY) durant le congé de l'Action de Grâces (11 au 13 octobre 2008). Les débutants sont aussi les bienvenus. Au programme: des cours pour débutants, des conférences diverses, des jeux de société, du plein air, une soirée culturelle et bien plus. Le site est vraiment enchanteur et les étudiants peuvent partager un chalet avec repas en commun. Le thème cette année est les langues. Voir le site web suivant pour plus d'information et vous inscrire : [www.esperanto.qc.ca/fr/are](http://www.esperanto.qc.ca/fr/are)

# Montrealaj Esperanto-kunvenoj (MEK)

DATO	KIE	HORO	TEMO
11 - 13 Okt. 2008	Silver Bay		Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto (ARE)
31 Okt. 2008	Commensal *	19 h	Internacia jaro de lingvoj
28 Nov. 2008	Commensal *	19 h	Ĉio pri fagopiro!
13 Dec. 2008	Commensal *	18 h	Esperanto-Festo
30 Jan. 2009	Commensal *	19 h	Temo decidota
16 - 18 Majo 2009	Toronto, Ontario		Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto (MEKARO)
10 - 12 Okt. 2009	Silver Bay		Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto (ARE)
15 - 17 Majo 2010	Kebeko, Kebekio		Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto (MEKARO)
9 - 11 Okt. 2010	Silver Bay		Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto (ARE)
14 - 16 Majo 2011	Kingston, Ontario		Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto (MEKARO)
19 - 21 Majo 2012	Tririveroj, Kebekio		Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto (MEKARO)

\* **Commensal restoracio** : 1720, rue Saint-Denis, Montréal

\*\* **Montreala Esperanto-Domo (MEDO)**: 6358-A rue de Bordeaux, Montréal

Entre Papineau et De Lorimier.

Métro Beaubien, Autobus 18 Beaubien Est

Voir le site web pour un plan d'accès : [www.esperanto.qc.ca](http://www.esperanto.qc.ca)

19 h *Horo por komencantoj, lernado, konversacio, demandoj pri la movado.*

Heure pour les débutants : conversation, questions, grammaire...

20 h *Anoncoj, libera babilado, aliĝo al ESK.*

Annonces, discussions libres, adhésion à la SQE.

20 h 30 *Tema programo, diskuto, kvizo, ludo...*

Programme thématique, discussion, quizz, jeux...

## Montrealaj kunvenoj

La kunvenoj okazas la lastan vendredon de la monato krom en Julio, Aŭgusto kaj Decembro.

## Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto (MEKARO)

Celas kunigi esperantistojn el Ontario, Kebekio kaj nordorienta Usono. Temas pri turisma semajno kun diversaj vizitoj en amikeca etoso. Ne okazas kursoj kaj movadaj kunsidoj.

## Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto (ARE)

Kunorganizita de ESK kaj Esperanto-Societo de Nov-Anglio (ESNE). Celas kunigi esperantistojn el nordorienta Kanado kaj Usono. Ĝi okazas en YMCA de Silver Bay apud Lake George, NY en tre bela natura medio. Vidu retejon de ESK por pliaj detaloj kaj aliĝi. [www.esperanto.qc.ca](http://www.esperanto.qc.ca)

Por komentoj, proponoj, demandoj : [informo@esperanto.qc.ca](mailto:informo@esperanto.qc.ca)